

Heredantoj de Dharmo

Dhamma-dajada Suto (Maĵhima Nikajo 3)
法相續經

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

Kiam la sankta Gotamo kaj liaj disĉiploj loĝis en la plezurparko ĉe Savathio, iam okazis, ke la Beatulo admonis la sanghanojn, dirante:

“Vi estu heredantoj de la doktrino, fratoj, kaj ne rilatigu vin kun mondaj aferoj aŭ bezonoj. Vi scias, ke mi diras ĉi tion al vi el mia plena koro kaj por la propra bono via, ĉar mi ŝatas, ke oni parolu estimeme pri vi, kaj ke oni diru: ‘Videble la sekvantgoj de Gotamo estas estiminduloj, vivantaj laŭ la doktrino, kaj ne celantaj mondan komforton aŭ vivadon maldiligentan.’ Lasi sin gliti en malzorgan kondutadon estas danĝere, ĉar la mondanoj estas ĉiam pretaj mallaŭdi kaj kritikaĉi tiujn, kiuj pretendas sin montri kiel ekzemplojn de prava vivmaniero; kaj, se vi malatentas tion, ke vi vivu laŭ la doktrino en ĉio kaj ĉiam, la mondanoj baldaŭ ridos pri vi kaj diros: ‘Jen, la disĉiploj de Gotamo ne praktikas liajn instruojn; efektive ili parolas tiele kaj agas alie.’”

“Per malgrandaj aferoj la realeco kaj valoro de la doktrino montriĝas. Vi estu atentemaj en ĉiuj aferoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj. Ekzemple, ni supozu, ke mi havas ioman restaĵon de la meztaga manĝo. Okazas, ke du sanghanoj alvenas ĉi tien, ambaŭ lacaj kaj malsataj; kaj supozeble mi proponas la manĝaĵon al ili, en la ordigado post nia manĝo, pli volonte ol ke mi forĵetu ĝin. Povas esti, ke unu el tiuj sanghanoj diras al si: ‘Mia korpo avidas tiun ĉi manĝaĵon, sed, se mi min detenas de la kontentigo de mia avido, tiu disciplinigo estos pli bona kaj pli ĝuste akordas kun la doktrino. Tial mi elportos la lacegon, kaj mi ne mildigos la malsaton, ĝis mi venkas tiun ĉi avidan senton en mia korpo.’ La alia sanghano diras al si: ‘Jen estas bona manĝaĵo, libere proponata, nur forĵetota se ne nun manĝata. Mia korpo estas laca pro malsato, kaj tial mi ĝin manĝos, por ke mi ne suferu nenecese pro malsato.’”

“Nu, la dua sanghano agas prave, manĝante kaj tiel konservante sian bonfarton kaj sanon; sed la unua sanghano pli meritplene agas, ĉar li komprenas, ke tia konduto helpas lin finfine al pli frua rego super si mem, kaj al la atingo de vera paco, trankvilo kaj forto.”

“Tial, sanghanoj, penu kompreni, kial mi konsilas al vi, ke vi sekvu la doktrinon, kaj jam ne estu ĝenata de zorgoj pri la necesoj de la vivo.”

Je la fino de sia parolado la sankta Gotamo leviĝis kaj eniris en sian loĝejon.

Tiam la respektinda Sariputo sin turnis al la kunvenintaro kaj demandis: “Ĉu vi ĉiuj elkomprenas la signifon de tio, kion ĵus diris al vi la Majstro? Ĉu vi komprenas, kiamaniere iuj el vi ne sukcesas plenumi la doktrinon?”

Tuj aŭdiĝis voĉoj ĉe ĉiuj flankoj petante, ke la respektinda Sariputo klarigu tion, kion ili ĵus aŭdis.

“Bone, do”, diris Sariputo. “Sendube vi scias, ke kelkaj el vi ne praktikas la disciplinon, kiel ĝi estas elmetita de la Majstro. Tion, kio, laŭ la diro de la Majstro, estas evitinda, kelkaj el vi ne tute evitas. En kelkaj okazoj multaj el vi kulpas pri malvigleco kaj sinindulgo pri malgrandaj aferoj, kiuj altiras la kritikon de la mondana publiko. Precipe pri tri aferoj oni diras, ke kelkaj el vi reflektas senkreditigon al la doktrino kaj al la Majstro, nome: ke multaj disĉiploj malatentas la ordonon pri ĝustaj tempoj pasendaj en soleco; ke ili ne plenumas sindisciplinigon; ke ili ribelas kontraŭ la reguloj de la ordeno. Nu, pro tia malsaĝeco hontas la tuta frataro, kaj tiuj el vi, kiuj scias, ke vi kulpas pri agoj, kiuj alportas malrspekton al la ordeno, atentu, ke vi rapide rebonigu la domaĝon per via estonta konduto.”

“Atentu pri la instruo, kiun ni ĉiuj jam ricevis. Ĉiu persona deziro kaj ĉiu malsato, ĉiu malamo, estas malbono, kaj por ke ni senigu nin de malbono necesas nur, ke ni sekvu la mezan vojon al saĝeco, nome: pravan komprenon, pravan celon, pravan paroladon, pravan konduton, pravan okupon, pravan klopodon, pravan pripenson, kaj pravan mediton.”

“Ni tute forigu envion kaj koleron el niaj koroj. Ni plenkonscie evitu ĉian hipokritecon, sinestimon, rusemon, diboĉemon, fieron, kaj trompemon - por mallonge diri: ni evitu ĉian malbonon, ĉar la meza vojo kondukas al scio, elkompreno, kaj al supera lumiĝo, al Nirvano.”

Je tiuj ĉi lastaj vortoj, Sariputo ridetis kaj ĉesis paroladi.